# *Kubo: solidaremo internacia kiel protektilo de la homaj rajtoj.*



Kubo elstarigis en ?enevo la gravecon de la internacia solidaremo en la impulsado kaj protekto de la homaj rajtoj, en strikta  kongruo kun la celoj kaj principoj de la ?arto de UN.

Solidaremo estas potenca instrumento por respondi al la defioj mondaj en tiu ?i temo, esprimis Pablo Berti, reprezentanto de la insulo, dum sia interveno en la XXIV-a ordinara sesia periodo de la konsilantaro de homaj rajtoj, raportis la informagentejo Prensa Latina.

Rilate al edukado, li esprimis ke la rajto al ?i estas esenca por la estonteco de la socioj, kaj ties privatigo rezultigas ekskludigon kaj mar?enigon.

Tial Kubo defendas la rajton je ?iuj personoj al edukado senpaga kaj kvalita. La registaro donas la plej grandan atenton al la plena realigo de tiu rajto por ?iuj civitanoj, li aldonis.

La diplomato memorigis ke en ?usa raporto de la UNESCO oni elstarigis la atingojn de la kariba lando en tiu agadkampo al kiu ?i disponigas 13% de sia malneta interna produkto.

En interaktiva dialogo pri la homaj rajtoj de la internaj movigitoj, Kubo insistis je la bezono alfronti la ka?zojn de tiu situacio, specife  tiuj rilataj al la ekonomia evoluo.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/59664-kubo-solidaremo-internacia-kiel-protektilo-de-la-homaj-rajtoj

**Radio Habana Cuba**